NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliajn tagojn, aŭtomata respondilo
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
JUNIO 1997

## HEF ANGULO

La suplemento "Informática" de ABC inkludis la 30-an de aprilo informon pri la interneta paĝo de HEF.
HEF eldonis la propagandan broŝuron "Pro Esperanto". Ĝi ampleksas 80 paĝojn verkitaj en la hispana lingvo de A. Alonso, kun altnivelan kaj moderne informadon pri la internacia lingvoproblemo, kaj pledadon kun proponoj por solvo de ĝi pere de esperanto. Po 200 ESP vi povas aĉeti ĉe HEF-CO.

## ESPERANTO EN "INTERNET"

Ekde marto legeblas en Interreto la revuoj:
Gazeto Andaluzio
http://www.redestb.es/personal/delpozo
Esperanto sub la suda kruco
http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/5541/esk.htm
Ĉizilo (Kostarika Universitato)
http://cariari.ucr.ac.cr/~filo/kovrilo.htm
Monata revuo "Esperanto Prismo"
http://members.aol.com/prismo/prismo.html

Se vi demandas pri esperanto ĉe "internet" pere de MetaCrawler Search Results vi trovos 47 adresojn, jen kelkaj:
Flavaj paĝoj de esperanto
http://www.bekkoame.or.jp/~taon/flavaj-pagxoj.html
Esperanto. La internacia lingvo
http://wwwtios.cs.utwente.nl/esperanto/

La signo ~ povas estis eskribita pere de WP jene: CTRL+V, 7.171 kaj en Internet pere de ALT 1,2,3

IDIOMA COMÚN

El esperanto es una lengua ideada para facilitar la comunicación entre personas de distintas culturas. Oficialmente reconocida por la UNESCO, es internacional y neutral porque no pertenece a ningún país. Estudios pedagógicos demuestran que es hasta diez veces más fácil de aprender que cualquier otro idioma. Todo esto todavía nos suena muy lejano, pero la realidad es que hay mucha gente estudiándolo ya. Los creadores de esta web son una asociación sin ánimo de lucro, ni ideología política, cuyo único fin es el uso y la difusión del esperanto y su cultura. Editan libros y publicaciones, celebran congresos y seminarios y organizan cursos. En este marco, la asociación realiza, a nivel internacional, tareas de difusión de la cultura hispánica en sus diversas manifestaciones e intercambios culturales. Cualquier interesado en aprender el idioma universal, anote la siguiente dirección: **<http://home.adv.es/esperanto/>.**

## HISPANIO

*Informe sobre el Esperanto 2.* Hispanlingva programo pri Esperanto. Haveblas en 2 versioj: provversio (1 disko), kontraŭ 300 ptoj (poŝtstampoj) aŭ sendante diskon kaj ŝtampitan koverton; versio kompleta (5 diskoj) kontraŭ 2000 ptoj (per antaŭpago) aŭ 2000 ptoj + sendokostoj. Ambaŭ versioj obligas aŭskulti esperantajn vortojn kaj muzikaĵo(j)n (komprenebIe pli da ili en la versio kompleta). Perfekta por viaj neesperantistaj geamikoj. J. F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago, Hispanio.

En junio aperos la numero 50-a de la revuo "Gazeto Andaluzia", jarkvarona revuo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo. Ni deziras al redaktoraro kaj AEU-anoj longan daŭrigon por la revuo.

Hispana Esperanto-Muzeo havas propran festotagon: la trian dimanĉon de junio. **Sant Pau d'Ordal** (Barcelona). Sendu salutojn al jena adreso <museo.esperant@redestb.es

En **Figueres**, dum majo okazis la 28-a kongreso de Kataluna E-asocio, sen la ceremonio de Internaciaj Floraj Ludoj, ĉar tiu konkurso ĉesis. Arto kaj literaturo tamen ne dizertos la programon de la kongreso, kiu koincidas kun la unua Transpirinea Kongreso.

Informas la revuo "Kataluna Esperantisto" ke en Katalunio, E-o fariĝis ekzamen-temo, en oficiala ekzamenaro por estontaj universitatanoj. La kandidatoj devis, leginte komunikaĵon anglalingvan de la agentejo Reuter pri la Tamperea UK, verki aŭ pledon por la angla kiel internacia lingvo, aŭ tekston "Al la gejunuloj de la mondo", titolo kiun la tezo erare atribuas al "la lasta mesaĝo verkita de Zamenhof"

En **Segovio** jam finiĝis la kurso gvidata de César de Mosteyrín por instruistoj de la angla, laŭ la metodo "Jen nia mondo". Du lernantoj aliĝis al HEF kaj UEA. Bravo César!!

## ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

En la numero 2348 de la revuo "Lecturas", sekcio "Ideas" estis publikigita eta informo pri Esperanto, kun la adreso, por eblaj interesitoj, de Barcelona Esperanto Centro.
Ràdio Bronka (92.3) de Barcelono elsendas novaĵojn en esperanto.

## EKSTERLANDE

Jam estas preta manlibro por la instruado kaj lernado de esperanto pere de videokurso speciale verkita por hispanparolantoj fare de Enrique Kohei. La kurso konsistas el 22 leccionoj en unu video-kasedo. Eblas fari ĝin individue aŭ grupe, kun aŭ sen gvidanto. Esperanto-Klubo de Venado Tuerto, Casilla Correo 407, 2600 Venado Tuerto, Argentina.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenas, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

**Prelegoj:** 19,30 horo en Atocha 98-4°

16-an "Astura natura parko de Somiedo". C. Suarez

> **VENAS SOMERO**
> Aĉetu ĉe MEL T- ĉemizojn kun verda stelo ĉirkaŭita de la vorto ESPERANTO.
> Prezo: 600 PTA plus sendokosto
> 20% rabato por pli ol 20.

## VALENCIAJ KONGRESOJ

Kiel ni jam anoncis, Reĝino Sofia akceptis la honoran prezidantecon de la 7a Internacia E-Kongreso en Valencio.
Dum la kongreso okazos omaĝo al Juan Carlos Ruiz, Ada Fighiera-Sikorska kies rememoro estas tre viva en la hispana E- komunumo, kaj al Fernando de Diego.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

7-a Internacia Kongreso de Monda Turismo. Valencio (Hispanio) 8-13 julio.
**56-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO. Valencia (Hispanio) 8-13 julio**
82-a UK de Esperanto. 19-26 julio 1997. Adelajdo (Australio)

***16-25 de julio INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ PER ESPERANTO. U. DE Santiago de Compostela: Sur la spuroj de F. García lorca, Enkonduko en la eŭropa juro, Elementa kaj praktika kurso pri astromonio. Prezo 52.000 ESP (kun ekskurso, loĝado kaj manĝoj) Limdato por aliĝoj ĝis la 1-a de julio. Adreso: Cursos Internacionales de Esperanto. Facultad de C. POlíticas. ES-15706 Santiago de Compostela. Teléfono y fax: 981 59 80 05. e-poŝto iliespnto@usc.es***

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

# Fighiera: duonjarcente aktiva

**Duona jarcento je aktiva servo de la internacia lingvo estas la enviinda rekordo, kiun celebras en 1997 la 68-jara Gian Carlo Fighiera.**

Mallonge skizita, lia engaĝiĝo startis en 1947, kiam la itala movado renaskiĝis el la cindroj de la dua mondmilito. En sia naskiĝurbo Torino, Italio, G. C. Fighiera (18-jara studento) agadis dum ok jaroj kiel disvastiganto de la lingvo, kuragvidanto, organizanto de amaskursoj, kunlaboranto de UEA por la Montevidea Unesko-kampanjo (1954) kaj fondinto de la informa fako de Itala E-Federacio, kies vic-prezidanto li fariĝis kiam ĝi translokiĝis al Torino.

En 1955, Fighiera gvidis la gazetaran servon de UK en Bolonjo (Italio) kaj estis nomita KKS (Konstanta Kongresa Sekretario) de UEA, kun la tasko ĉiujare loĝi 11 monatojn antaŭ UK en la laŭvica kongres-urbo, por tie surloke organizi la Universalan Kongreson kunlabore kun LKK. Dum 6 jaroj Fighiera deĵoris sinsekve po 11 monatoj en Kopenhago, Marsejlo, Majenco, Varsovio, Bruselo kaj Harrogate (Britio). En tiu periodo Fighiera helpis la lokan movadon per multnombraj paroladoj, preleg-vojaĝoj, kursoj, intervjuoj, artikoloj kaj agado en la kluba vivo. Unu el liaj ĉefaj atingoj kiel KKS (krom intenaigo de la ekstera informado kaj plialtigo de la kultura nivelo de la UK) estis la fondo de la Infanaj Kongresetoj fare de li kaj Karen Bjørnby en 1956.

En 1960 li edziĝis al Ada Sikorska, tiama redaktorino de la tutnovaj E-elsendoj de la Pola Radio. La paro inter si uzadis nur Esperanton dum 35 jaroj, nome ĝis la forpaso de Ada. En 1961 Fighiera lasis aian postenon de KKS kaj migris al Bruselo (Belgio) por transpreni la oficon de ĝenerala vic-sekretario de la internacia asocio de vojaĝagentejoj FUAAV/UFTAA. Samtempe, li fondis la asocion sen profita celo "Heroldo de Esperanto", kiu daŭrigis la eldonon de la samnoma gazeto (fondita de Teo Jung en 1920) redaktatan de Ada. Fighiera prezidis la asocion kaj ekde 1962 helpis la edzinon dum 35 jaroj en la administra kaj redakta laboroj. Krome, li iniciatis la eldonon de tre sukcesaj altnivelaj E-lernolibroj (angla, franca, germana, hispana kaj itala) kaj *Paŝoj al plena posedo* de William Auld; ĉiuj lernolibroj konis plurajn eldonojn kaj instruis al miloj da homoj.

Fighiera vivis en Bruselo dum 17 jaroj. Profesie, li fakiĝis pri entreprena mastrumado kaj internacia turismo; organizis centon da internaciaj kongresoj kaj kunvenoj en kvar kontinentoj: de Bonaero al Hong-Kongo, de Abidjan al Miami. Samtempe, en la esperantista kampo, li agadis por la belga movado kaj la Brusela E-grupo, kies vic-prezidanto kaj, poste, prezidanto li fariĝis. En Bruselo Fighiera organizis la Antaŭkongreson de la Haga UK (1964) kaj aperigis

serion da kritikaj artikoloj por plibonigi la mastrumadon kaj la agadon de la internacia movado.

En 1978, la interŝtata Monda Turisma Organizo (MTO) vokis lin al Madrido (Hispanio) kun la tasko prepari la Mondan Turisman Konferencon (Manilo, 1980). Kunlabore kun Lengyel, Fighiera sukcesis akceptigi rekonon pri esperanto en la fina Manila Deklaracio subskribita de 103 registaroj.

En Madrido, Fighiera (poste nomita direktoro de MTO por Eŭropo kaj Proksima Oriento) restadis 10 jarojn, dum kiuj li aktivadis en la hispana kaj Madrida movadoj, i. a. kunlaborante en la preparo de naciaj kongresoj en Madrido kaj Valencio. En 1982, li eldonis en la Antverpena UK por la kongresanoj taggazeton kun ankaŭ neesperantistaj informoj. Laŭ komisio de la Estraro de UEA, en 1986 post tritaga restado en Roterdamo li verkis 27-paĝan raporton pri la harmoniigo de la administra laboro en la Asocio kaj pri la vojoj por forigi ĝian ĉiujaran deficiton. En Varsovio, 1987, la Komitato de UEA aprobis lian principan rezolucion pri la harmoniigo kaj elektis lin estrarano por financoj: la postenon li forlasis kelkajn monatojn poste pro neebleco apliki la rezolucion.

Emeritiĝinte, Fighiera revenis al sia naskiĝurbo Torino, en 1988, kie li tuj eklaboris por Eo en la kadro de la loka grupo kaj kiel estrarano de la Fonduso Marelli, aktivigita de li, kiu ĉiujare sendas junulojn al UEA- kaj TEJO-kongresoj; en 1991, li organizis la tre sukcesan italan E-Kongreson en Torino kun nova iniciativo: Universitata Ronda Tablo pri la lingva problemo; en 1993 li organizis la eksteran gazetaran servon de la Valencia UK, eble la plej vastan en la tuta historio de la UK. En la sama UK, la Komitato de UEA adoptis lian tezon, ke la jara deficito de la Asocio devas esti forigita.

En 1995 li estis invitita prezenti raporton al la Eŭropa E-kongreso en Parizo: en tiu okazo li verkis la 57-paĝan dokumenton "Esperanto preter la jaro 2000".

Nuntempe, Fighiera daŭre aktivas por Eo (en somero 1997 li gvidos kurson ĉe la Domparo kaj ĉefprelegos en la internacia E-kongreso en Valencio). Profesie, li docentas pri kongresaj merkato kaj teknikoj en superaj lernejoj kaj universitataj fakultatoj, laboras kiel konsultisto pri la samaj temoj kaj publikigas fakajn esplorojn. En la pasintaj du jardekoj, Fighiera verkis kvin fakajn librojn en franca kaj itala kaj dudekon da fakaj eseoj kaj monografioj en franca, hispana kaj itala. Ekde 1995 Fighiera estas eksperto de la Programo de Unuiĝintaj Nacioj por Disvolviĝo (UNDP/PNUD) kaj kunlaboranto de Eŭrostat por harmoniigo de la kongresaj statistikoj. La edzino Ada Fighiera-Sikorska mortis en 1996: rimarkinde, ke eĉ en la malsanuleja lito ŝi laboris por esperanto. Post ŝia forpaso, Fighiera mem redaktis la lastajn kvar numerojn de 1996 de "Heroldo" kaj poste transdonis la gazeton al Kooperativo de Literatura Foiro, kiu daŭrigas la tradicion de la periodaĵo.

*La redakcio kaj la eldonejo gratulas al sia amiko Gian Carlo Fighiera.*

Heroldo de Esperanto n-ro 1090
marto 1997